# LA TAŬRA VOĈO

Kongresa Kuriero de la 108a Universala Kongreso

Lundon, la 31an de Julio 2023 Numero 3


## Salutvortoj de Andrea Bocelli (Mondkonata kantisto)

Mi deziras transdoni miajn plej korajn salutojn kaj bondezirojn por fruktodona laboro al ĉiuj partoprenantoj en la 108-a Universala Kongreso de Esperanto: evento de eksterordinara graveco, kies okazigo ĉi-jare en Italio min orgojligas, kaj en kies Honora Komitato (pro nemeritita privilegio) aperas mia nomo.

Mia ĉefa pasio, transformita en mian profesion de ĉirkaŭ tridek jaroj, konstante igas min esplori la formojn de esprima komunikado kaj la muzikecon kunnaskitan en la multaj lingvoj en kiuj mi kantas.

Krom tio, mi havas agrablan memoron pri mallonga periodo, dum kiu mi adoleska havis kiel pianoinstruiston pasian esperantiston (kies nomo estis Carlini), el kiu mi lernis kelkajn rudimentojn de tiu ĉi genia internacia lingvo.

Sed mi ne estas lingvisto, kaj mi preskaŭ ne havas specifajn kapablojn, tiajn ke mi aŭdacu hazardajn pripensojn, kapablajn fari eĉ la plej etan akceladon al la hodiaŭa kongresa laboro. Tamen mi nepre deziras esprimi mian tutan simpation al idiomo, kiu – same kiel bonkvalita muziko – disbatas barojn kaj konceptiĝis laŭstatute por kunigi, por faciligi la dialogon inter la popoloj.

Antonomazie universala lingvo, Esperanto kuntrenas filozofian projekton kaj etikan plusvaloron kun eksterordinara kvalifiko. Naskita el revo, nenies unua lingvo kaj do potenciale ĉies dua lingvo, aldone mi amas Esperanton, ĉar ĝi portas eĉ en sia nomo la forton de atendo, de fido al la homaro kaj al la kapablo venki la evoluon de konflikto (kiu estas, ĉiam kaj en ĉiuj ĝiaj formoj, nenio alia ol intelekta akcidento).

Paco en si mem estas la plej oportuna kaj evidenta afero, kiun la homaro devus celi. Nu, mi opinias, ke Esperanto povas alporti signifoplenan helpon al ni ĉiuj, kunloĝantoj de la tero, por atingi tiun celon, por transformi la revon en realon.

La ekzemplo mem – kvankam neglektinda – de mia ekzista kaj profesia vojo konfirmas tion, je kio mi firme kredas: nome, ke ne ekzistas malebla revo. La esenco estas kredi je ĝi kaj strebi al ĝi kun forto, intelekta honesteco kaj disciplino. Ĝuste kiel vi faras, subtenante per viaj studoj, per via inteligenteco kaj volo, tiun revon – ĉiam pli proksiman kaj konkretan – pri lingvo komuna al la popoloj de la mondo.

## PROGRAMO

### Kleriga Lundo

#### Unua bloko: 9h – 10h30

*François Lo Jacomo*: Kiun rolon havu la Esperanto-movado pri ĝemelaj urboj? (Hodler)

*Prof. Maria Butan*: Pejzaĝoj, kiuj influas nin. (Grattapaglia)

*Mirejo Grosjean*: Aikido. (Canuto)

*Sylvain Lelarge*: La cent paŝoj. (Bourlot)

*Rakoen Maertens*: La psikologio de falsaj novaĵoj: Kiel protekti sin kontraŭ la influo de misinformoj. (Fighiera-Sikorska)

#### Dua bloko: 10h45 – 12h15

*István Szabolcs*: Esperanto kaj la heksametroj. Subtitolo: Poemo de Sándor Petőfi: La Juĝo. Analizo de la Esperanta traduko en heksametroj (Hodler)

*Prof. Paraŝkeva-Eva Bojaĝieva*: Metabola rolo de iuj elementoj (Grattapaglia)

*Bernhard Tuider*: La Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Historio, havaĵo kaj aktualaj projektoj. (Canuto)

*Katalin Kovats*: KER-iga lundo: B1+B2+C1+X=KER. (Clerici)

*Humphrey Tonkin*: Kio farendas? (Fighiera-Sikorska)

#### Tria bloko: 12h30 – 14h00

*Manuela Ronco*: Filmoj kaj serioj kun fortaj inaj karakteroj: kiel aktivigi siajn feminismajn lensojn antaŭ la ekrano. (Hodler)

*Thierry Spanjaard*: Metromapoj, esplorenda universo! (Grattapaglia)

*Renée Triolle*: La fratoj Lumière: inventistoj kaj aferistoj. (Canuto)

*Kristin Tytgat*: Belgio, Babilado kaj internacia komunikado. (Clerici)

*Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar*: La movada rolo de Esperanto-Centroj – modelo Herzberg. (Fighiera-Sikorska)

## ASOCIOJ

### Ekumena diservo kaj katolika meso

Kiel kutime dum la UK, dimanĉe posttagmeze okazis la Ekumena Diservo kiun partoprenis kongresanoj kristanoj: katolikoj, malnovkatolikaj kaj protestantoj. Ili ĉiuj kune preĝis kaj kantis por la intenco je paco en la mondo kaj por unueco de la kristanoj.
La diservon prizorgis IKUE kaj gvidis ĝin p. Hatto von Hatzfeld, kaj predikis p. Hubert Michael Schweizer.
Post la ekumena diservo okazis la katolika meso kiun kuncelebris p. Hatto von Hatzfeld, fr. Benoit Ente kaj p. Gustavo Zanolli.
Ambaŭ ritoj okazis en la preĝejo Maria Ausiliatrice (Helpantino) (Via Giuseppe Piazzi 21/23) kie ĉiutage (krom merkredo) je la 8.45h okazos mesoj en Esperanto.
Lundon, la 31an de julio dum la meso oni aparte preĝos por la mortintaj Esperantistoj.

*Marija Belošević, KN 117*

## KOMUNIKOJ

### Ĉukpilka leciono



La 3an de aŭgusto, ĵaudon, ĉe la kongresa sportejo en Corso Ferrucci 63, de la horo 17a okazos la programero: "Lernu ludi ĉukpilkon en 1 horo!"

### Prezoj de manĝkuponoj

La manĝkuponojn eblas aĉeti en la Informejo de la Kongreso ĉiutage de la 9h00 ĝis la 11h00.
9 € (kompleta menuo)
Pastaĵo (supo aŭ rizo) kaj ĉefplado kun legomoj, frukto aŭ deserto, panoj kaj trinkaĵoj.
Griza kupono
7 € (Menuo A)
Pastaĵo (supo aŭ rizo), legomoj, frukto aŭ deserto, pano kaj trinkaĵoj
Helblua kupono
8 € (Menuo B)
Ĉefplado kun legomoj, frukto aŭ deserto, pano kaj trinkaĵoj
Flava kupono
Eblas vidi la menuon de la tuta semajno apud la afiŝo ĉe la anonctabulo.

## ANONCOJ

### Dankoj

Danke al Aleksandro, Olga kaj Patrick, la unua ekskurso al Ĝenovo estis sukceso, malgraŭ akcidento sur la aŭtoŝoseo kiu malfruigis nian alvenon pli ol horon. Ni dankegas la organizantojn. En la hieraŭa Kuriero vi povis vidi la foton de la partoprenantoj kiuj restis ĝis la fino.

*Eric Nemes, KN 365*

### Radioamatora ripetilo dum la kongreso

Danke al ILERA la voĉoj de Esperantistaj radiaj hobiistoj tra la mondo aŭdiĝas en Torino dum la kongreso per la aeraj ondoj. ILERA estas la Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj kaj estas faka asocio de UEA.
Paolo, kies radio-voksigno estas IZ1POZ, aranĝis la uzon de radio-ripetilo dum la kongreso.
Radio-hobiistoj konektiĝas kun la ripetilo per speciala ILERA-servilo uzante aplikaĵon nomata Eĥolinko per sia komputilo aŭ aptelefono.
Dum unu horo meztage de 12:00 ĝis 13:00 en Torino, por la komforto de tiuj en la horzonoj de Afriko, Azio-Pacifiko, Eŭropo kaj Mezoriento, kaj denove de la 20:00 ĝis la 21:00 por la horzonoj en la amerikaj landoj, ILERA-membroj gastigos la konversaciojn.
La ĉefa celo de ĉi tiu aranĝo estas, ke ne esperantista radioamatoroj en Torino povu aŭdi Esperanton parolatan kaj aŭdi pri Esperanto kaj la kongreso. Ĝi ankaŭ donas al Esperantistoj, kiuj uzas Eĥolinkon, la ŝancon esti parto de la kongreso en eta maniero.
Bonvolu trovi nin kaj diri vortojn de saluto per amatora radio.
La ripetilo estas apud Torino, frekvenco 430.5 MHz, +5MHz, 82.5 Hz, voksigno IR1UDT.

*Paolo Omodei-Zorini KN 551*